9a Jaro No. 1a — 1a Januaro 1920

# INTERNACIA SOCIA REVUO

MONATA ESPERANTA GAZETO

internacie redaktata pri ĉio, kio interesas la homaran vivadon.

Redakcio kaj Administracio: W. Nutters, Ostadestraat 94, Amsterdam, Nederlando. Por Germanio: R. Mahns, Berlin NO 43, Neue Königstraße 24; por Francio: R. Louis, rue Beaubourg 28, Parizo; por Anglio; H. Hyams, 17 Hart Street, London W. C. — Prezo de jarabono 2½ guldenoj en holanda valoro (po numero en Germanio: 60 Pf., en Francio kaj Belgio: 50 cent., en Anglio: 4 d.)

L71 1.6.1985

## Reviviĝinta.

Fine do nia I. S. R. povas reaperi. Nia Revuo estis unu el la unuaj viktimoj de l' milito — la numeron de Aŭgusto 1914 ni povis forsendi nur al tre malmultaj landoj — preskaŭ ĉiuj ekzempleroj restis ĝis nun en la administrejo. Dum la milito la redakcio eldonis (en Decembro 1914) unu militnumeron. Sed ankaŭ tiu numero kuŝas grandparte ankoraŭ en nia ŝranko. Post la milito la klopodoj por retrovi la antaŭajn legantojn kaj agentojn donis malmulte da rezultatoj — el niaj kamaradoj multaj ripozas jam de longe en la imperialista lito de kalko vivanta; nur malmultaj revenis al sia antaŭa loko. Krom tio leviĝis diversaj aliaj baroj. La prezoj de presado freneze altiĝis. La valutoj troviĝas en ĥaosa stato, tiel ke, ekzemple, por ricevi en Amsterdam 12½ cendojn por unu ekzemplero de I. S. R. germano devus sendi tien du markojn, aŭstriano kvin kronojn, franco duonfrankon, ktp. Do, dum la legantaro kvinoniĝis kaj la prezoj kvinobliĝis, la valuta ĥaoso neebligis fiksi konstantan kaj egalan prezon por ĉiuj landoj. Ĉiuj ĉi malfacilaĵoj ankoraŭ hodiaŭ ekzistas. Ni tamen riskis la reeldonadon de nia Revuo. Ĉar en la nuna tempo ĝi povas esti treege utila — por Esperanto kaj por socialismo. Estas ja tiom por diskuti inter ni, ni havas tiom multe por priparoli kaj por rakonti unu al alia, ke nia Revuo devas, nepre devas de nun regule aperi.

Ĉu ĝi jam povas ekzisti? Tio dependas de la kamaradoj. Se ili helpas nin trovi legantojn por ĝi, aŭ se ili povas kaj volas nutri ĝian kason per iom da helpmono, tiam la ekzistado de nia Revuo estas ekster danĝero.

Ni klopodu unue certigi la ekzistadon de I. S. R., due grandigi ĝin, trie malpliigi ĝian prezon. Individue kaj grupe la kamaradoj helpu nin atingi tiun celon.

Estas memkompreneble, ke I. S. R. bezonas, same kiel antaŭe, korespondantojn en ĉiuj landoj. Tiun ĉi unuan numeron redakcio sole plenigis preskaŭ tute. Tio ne estas bona. Ni devas, ni volas aŭdi voĉojn el ĉiuj anguloj de l' kripligita mondo, el ĉiuj direktoj de socialista pensado, por ke la enhavo de nia internacia organo estu konforma kaj inda al la grandega tempo, kiun ni travivas, en kiu antaŭ niaj okuloj malnova mondo ruiniĝas je rubo kaj nova mondo kun sangaj doloroj naskiĝas. Kun internacia saluto

W. Nutters.

★

## Krizo universala.

La kapitalista sistemo agonias, ĝia fino komenciĝis.

La tutmonda milito detruis la produktadofortojn de Eŭropo, elĉerpis la vivoforton de l' popoloj, ŝarĝis la ŝtatojn per gigantaj militŝuldoj. Post militfino multaj kredis, ke almenaŭ la venkintaj landoj povus atendi tempon de refiorado, de riparo de kapitalismo. Sed hodiaŭ estas klare, ke ĝi estos neriparebla. En la venkitaj landoj, ekonomie elrabitaj de la venkintoj, la ekonomia nemovado, la socia ruiniĝo, pleje estas progresinta: kaj de tie ia paralizo disvastiĝas sin okcidenten — al Francujo, al Anglujo, al la neŭtraloj, al Ameriko. La interkomunikado malordiĝis: manko je materialoj neebligas la rekonstruon de l' industrio, kaj pro manko je laborfortoj kaj je sterkoj la rikoltoj ne sufiĉas por la bezono. Pli grava ankoraŭ estas la ĥaoso de l' monosistemo. En la normala kapitalismo la mono estas la oleo de l' socia maŝino, la perilo de ĉiuj ekonomiaj procedoj. Hodiaŭ la necerteco de l' valutoj paralizas la nervojn de l' kapitalista produktado: la kreditsistemo. La senlime pliiĝanta kareco estas nur unu el la simptomoj de tiu elastikiĝo. La kareco proletariigas la mezklasojn, dum la amasoj estas elmetataj al ĉiam pliiĝanta mizero. Se la valoro de l' mono malpliiĝas, la laboristoj devas per striko defendi sian vivonivelon, kaj pro tio naskiĝas ĉiam pli akraj, pli multampleksaj konfliktoj inter kapitalo kaj laboro.

Kion signifas ĉi tio? La usona bankiero Warburg konstatas jenon: Eŭropo estas bankrota. Tio estas: Kapitalismo ekruiniĝas.

La pli profundaj kaŭzoj de tio estas sole kompreneblaj per la instruoj de Marx pri la esenco de kapitalismo. Ĉiuj prezentataj saviloj: perleĝa malpliigo de l' kareco, pliigo de l' produktado per pli intensa kaj pli longa laboro de l' laboristoj, riparo de nebarata interŝanĝado fariĝas kompatinda sensencaĵo sub la lumo de l' Marxista teorio pri la meĥanismo de l kapitalistaj produktado kaj ĉirkulado. Tiu produktado ne estas produktado por bezono, por ĝi ekzistas nur aĉetipova demando. Hodiaŭ ĉiu komenco de entreprenemo tuj paraliziĝas pro manko de vendeblo, kiam ĝi sukcesis transiri la barojn de manko je brulaĵo, de strikoj, de malfaĉilaĵoj de l' interkomunikado, ktp. Ĉar Germanio ne povas aĉeti, Anglio k. c. ne povas vendi, kaj tiel la krizo disvastiĝas tra la tuta „civilizita" mondo. En Ameriko troviĝas kvantegoj da materialoj, sed Eŭropo ne povas aĉeti ilin pro la alta dolarkurso kaj pro la altaj transportkostoj. Ĉiam denove ni aŭdas pri grandegaj kreditoj de amerikaj bankoj al Europo. Sed estas certe: neniu banko aŭ banktrusto oferos siajn miliardojn, eĉ ne se tio estus la sola rimedo por savi kapitalismon. Kapitalismo estas blinda forto, kiu pelas siajn mastrojn kiel blindajn sklavojn oron-soifantajn. Nenie estas videbla iu kaŭzo por revivigi la kapitalistan sistemon. Tutaj popoloj iĝas helpbezonaj: ĉiam pli la mondo profundiĝas en ĥaoso kaj mizero.

Surdaj kaj blindaj staras la homoj antaŭ tiu ruiniĝo de l' socio. La burĝaro penas kredigi al si mem kaj al aliaj, ke la revolucianoj preparas perfortan detruon de l' kapitalista socio por anstataŭigi ĝin per socio socialista. Ĝi ne scias, ke kapitalismo estas detruanta sin mem, ke socialismo estas la sola ebleco, la sola fundamento de rekonstruado, kiun homaro devas akcepti, se ĝi ne volas kune kun kapitalismo perei. La burĝaro persekutas la revolucianojn, malhelpas ilian propagandon en la sensenca espero tiel savi kapitalismon, dum ĝi per tio nur plilongigas la mizeron, prokrastas la novan mondordon. Tiu surdeco kaj tiu blindeco rilate al ĝia proksimanta pereo estas la historia fatalo de l' burĝaro.

Sed ankaŭ la amasoj de la laboristoj estas blindaj kaj surdaj kaj rigardas senkomprene ĉi tiun disvolvon. La espero, ke la pereo de kapitalismo trovos rerolucie preparitan kaj taskokonscian proletariaron, montriĝas utopio. La ruiniĝo venas tro rapide, ĝi surprizas la homojn, antaŭ ol iliaj spiritoj povis adapti sin al la nova realeco. Tio tamen signifas, ke ili nenion faros kaj senage kune-pereos kun la kapitalista mondo: ĝi signifas, ke la transformo en Okcidenta Eŭropo kaj en Ameriko ne iros laŭlonge la saman simplan kaj facilan vojon kiel en Rusio. Senfine pli grandaj malfacilaĵoj devas esti venkataj ĉie, kie profundradika burĝa civilizacio preskaŭ neekstermeble regadas ankaŭ la laboristojn. La vojo al socialismo iros laŭlonge nerektajn vojojn, trans multa kontraŭstaro, sub refaloj en malnovajn ideojn, tra nova trompado, kaj tra vanaj eksperimentoj kaj egaj aferoj. Unu jaro de giganta barakto universala estas antaŭ ni.

A. Pannekoek en „Nova Tempo".

★

## La Lumo de l' Mondo.

Nigra mallumo de ĉiaj terurajoj, de ĉia mizero estas super la tero. La popoloj mortas pro malsato. Tra tuta Orienta kaj Meza-Eŭropo milionoj da viroj, virinoj, infanoj velkadas. Centmiloj pereas kiel viktimoj de epidemioj: tifo, ĥolero. Ententekapitalismo regas la marojn, la landojn: ĝi blokadas tiun, kiu rifuzas submeti sin: ĝi tenas senkompate en siaj pugnoj materialojn kaj produktojn.

En Germanujo la militarismo regajnis preskaŭ ĉion, kion ĝi en Novembro 1918 perdis. Ĝi regajnis la perditajn poziciojn dank' al la Judasrolo de perfiduloj, kiuj elliveris la germanan popolon al la prusaj junkroj kaj al la Entente-bankieroj: kiuj sklavigis la germanajn laboristojn sub fremdaj mastroj, tial ke ili neniel volis aliĝi al Sovjet-Rusujo, aliĝo kiu sole povus — kaj ankoraŭ povas — savi Germanujon kaj Aŭstrujon el ekonomia, politika kaj morala pereo. Kaj la amasoj tion toleris sen unuopa rezisto. Ilia timemo, indiferenteco, blindeco kaj sklavemo estas pli densa nubaro super la tero ol la tuta materia mizero. La plej kuraĝaj estas falintaj, la plej bonaj pereis, estas mortigitaj de kapitalismo kaj ĝiaj servantoj. Kaj la amasoj ne stariĝis per venĝi ilin per la sola venĝo kiun ili deziris: batalo por socio komunista.

Tamen, la volo revolucia kreskadas en la mondo. La 3a Internationale kreskas: ĝi estos la organo de la lasta, longdaŭra, furioza barakto por la regno de Libereco.

La organizitaj aroj de l' anglaj laboristoj ekmoviĝas kiel nedigebla fluego, ĉiam leviĝanta, per nenio barebla. Ili postulas: sociigon de l' minoj, finon de l' blokado kontraŭ Rusujo, malaltajn prezojn, altajn salajrojn, 40-horan laborsemajnon, ĉion, kion kapitalismo ne povas doni. La volo al rekreo de l' mondo laŭ iliaj bezonoj, lumas ĉiutage pli klare en la koroj de tiuj fortuloj kaj persistuloj. La penso revolucia iĝas inter ili grandega potenco.

En Francujo malplimulto da socialistoj ktp. heroe bataladas; ilia propagando efikas; la movado estas puŝata maldekstren; la sovjetideo altiras la amasojn per sia pura brilo. En frata kontakto kun la revolucia parto de l' laboristaro batalas la plej bonaj el la intelektuloj, entuziasmaj animoj, koroj plenaj de kompato.

En Italujo la laboramasoj aprobas kaj akceptas la alvokon al batalo de l' revolucia plimulto de l' partio socialista. Ili direktiĝas al la proletaria diktaturo, al enkonduko de l' sovjetsistemo. Granda parto de l' malriĉaj kampistoj sekvas ilian standardon. Parto de l' armeo sin deklaris por la novaj idealoj. Tiuj idealoj entuziasmigas la junularon al arda oferemo.



En Germanujo la Sendependa Partio, kiu jam nombras nun tri kvaronojn de miliono da membroj, travivis treegan krizon. Ĝi jam tratranĉis multajn ligilojn, kiuj ligis ĝin al la senviva estinteco; ĝi turnis sin al estonteco, tio estas: al la ideo de l' masa batalo per diktaturo kaj sovjetsistemo. El ĝiaj estroj preskaŭ neniu povas tiel same rapidi kiel la amasoj en ilia kurego maldekstren.

En Svedujo, Norvegujo, Danujo, Svisujo, Hispanujo — landoj kun tre malsamaj estinteco, institucioj, cirkonstancoj — ni vidas la samon: la konvinko ke la tempo nun estas veninta, ne por batali por iomete malpliigi la premadon, sed por plena liberigo, por komunista Socio.

Tio estas la lumo kiu ĉie penetras. Ĉie. Ĉar ankaŭ la popoloj de Azio ekmoviĝas, popoloj kaj rasoj, kiuj dumlonge, kelkaj inter ili dum jarcentoj, estis nur objektoj de ekspluatado, produktantaj je profito de l' okcidenta kapitalismo, malriĉaj kaj mizeraj, senrajtaj kaj subpremataj. Ĉie ekbrilas la lumo de l' penso komunista, de l' volo al ribelo.

Sed la Lumo kiu brilegas en la mondo kiel diamanto, kiu jam estas konstanta, kiu ne paliĝas, tiu estas Sovjet-Rusujo. La kapitalismo de l' mondo elsendis ĉiujn potencojn de l' mallumo — perforto, malsato, subaĉeto, perfido, kalumnio — por estingi tiun lumon. Sed vane. Neniam okazis sur tero io tiel grandioza, kiel tio okazanta hodiaŭ en Rusujo. Neniam la mondo vidis tian miraklon.

Sovjet-Rusujo estas la lumo de l' mondo.

Ne ankoraŭ la lumo de universala amo, de universala homeco. El la noktnigra mallumo de kapitalismo tiu lumo nepovas tiuj supreniri.

Kion ni vidas, tio estas la aŭroro.

Rusujo, kiu tiom suferis, alportas al aliaj popoloj savadon.

★

## Germania revolucio.

Revolucio en Germanio! Wilhelm forpelita! Laboristaj kaj soldataj sovjetoj! La prusa militarismo pereinta! Vivu la Internacio! Ja, tiel aspektis en Germanio dum Novembro 1918. Sed pasis unu jaro kaj oni povis ekkoni, ke ĉio estis mensogo, trompo al la proletario. La sovjetoj estas malaperintaj aŭ subpremitaj. La militarismo novprusa estas eĉ plej aroga ol la pereinta. Kaj Wilhelm eĉ reestas — sed ne, pardonu, ne estas Wilhelm — estas Ebert. Sed la nomo estas negrava. Ambaŭ ludas la rolojn de popolfeliĉigaj vojaĝistoj, regnestroj difavorataj. Diferenco nur estas, ke Ebert estas pli ampleksa. Kaj denove okazas pogromoj de socialistoj — en la nomo de socialistaj registaranoj.

Kial? Kial? Kiel povis okazi tia terurega trompo, tia pseŭdo-revolucio.

Ne helpas, ĉagreni pri la nuna stato, ne helpas, plendi pri la skismo inter la socialistaro. Ne helpas, insulti la renegatoj de la socialismo, kiuj nun regas en Germanio. Ni rigardu objektive la faktojn.

Tia korprema malsukceso de revolucio ne estus ebliĝinta, se la germana proletariaro estus edukita revolucie. Jen estas la kaŭzo. Antau la militego la germana socialdemokrata partio klopodegis al granda membraro, al granda aro de reprezentantoj en la parlamentoj. Ĝi flankelasis la enprofundigon de la proletariaro en socialistan mentalon. Ĝi flegis la suprajan edukadon, la kredon al la frazeologio de la gvidantoj.

Tio sin venĝis jam dum la milito. La granda amaso kredis al la fantomo de l'patria defendo. La antimiltarismo ne estis sufiĉe forta por iu efika agado. Ĝiaj malmultaj anoj estis sendataj en pundomon aŭ en la tranĉeon. Kaj la socialistaj estroj, la socialistoj per la buŝo, sin deturnis de la kruda vojo de l'opozicio kaj sin ĵetis en la brakojn de la militistoj, komprenéble la hejmmilitistoj.

Iom post iom vekiĝis parto de la popolo. Iom post iom pligrandiĝis la aro da militkontraŭuloj. Ju pli frenziĝis la milituzuristoj, des pli vekiĝis la prudento de la proletariaro. En Januaro 1918 okazis kvazaŭ preludo de revolucio, amasaj strikoj. Sed ili ne efikis. Ĉar la stato sur la batalejoj estis favora al la germanaj militistoj. La gvidantoj de la strikoj estis sendataj militen. Tamen per tio ne ekdormis la revoluciemo. Malgranda — supera — parto proletariara klopodis al liberiĝo. Kaj en la Novembro 1918 tiuj klopodoj kuntrafis kun la katastrofo milita. Ĉi tiu tempa kuntrafo ŝajnigis revolucion tutnacian.

Sed trompas la ŝajno. La revolucia ideo ne jam estis eniĝinta la cerbojn de la proletariaro. Estis la malgranda supera parto de ĝi, kiu kunŝiris la amason por la unua momento. Sed tia momenta ekflamiĝo ne estas valora, kiel baldaŭ montriĝis. La unua ĝojego pro la militfino baldaŭ foriĝis kaj tiam sin malkaŝis la efektiva malabundeco de la revolucia ideo. Tiam montriĝis la manko en la socialista edukado. La enkonduko de la sovjeta sistemo — la konsekvenco de venka proletaria revolucio — estas neebla tiom longe, kiom ne ĉiu proletario estas trapenetrata de ĝia urĝa neceso. Kaj ĉi tiun trapenetritecon ni devas voli kaj aspiri. La sovjeta sistemo estas la palpebla celo de la proletariaro. Ĝia definitiva formo ne jam estas nedisputeble klara, sed unu estas klara: Ĝi unue postulas klerigitan proletariaron, ne klerigitan laŭ burĝaj metodoj, sed laŭ nova proletaria kulturo. Ĝia principo estas la klerigo laŭ ekonomia kaj politika bezonoj, la ekkono de la procedo de la produktado en la diversaj industrioj, la akordigo de ĉiuj ekonomiaj kondiĉoj al tutnacia, ja, tutinternacia bonstato.



Ne estas eble, diferenci inter ekonomia kaj politika movado. Ĉiu granda ekonomia striko estas politika, ĉiu politika movado efikas ankaŭ ekonomie. Ĉar la ekonomiaj postuloj de l'laboristaro celas la propran plifortigon kaj la malfortigon de la ekspluatantoj ĝis postulo de plena sociigo. Kaj politika celado al iu potenco de la proletariaro estas akompanata de la ekonomia liberiĝemo.

La venonta revolucio, kiu donos la potencon al la proletariaro, nur estas venka, kiam la plimulto de la laboristaro estas ekkoninta la neceson de memedukado, la bezonon de subtilaj konoj pri ekonomia funkciado.

Ne utilas frazoj kiel: ĉiu povo al la sovjetoj. Lernu kaj lernu, por ke ĉiu proletario povu esti sovjetano, nur tio igos nin venki.

Aso.

★

## La mizero en Aŭstrujo.

La mizero en Vieno estas, laŭ la Viena doktoro Molden, kiu vizitis ĵus Holandon, pli granda ol eksterlande oni povas imagi. Mankas ĉio, la prezoj de l' plej simplaj aĵoj estas fantaziaj. La infanoj ordinare enlitiĝas je la kvara posttagmeze, ĉar ne estas hejtaĵo por peli el la hejmo la vintran temperaturon, dum neniu manĝeblaĵo estas havebla.

Vespere oni ne povas lumigi la ĉambrojn, ĉar estas nek gaso nek elektro, pro manko de karbo. Miloj da homoj kaj da infanoj ne povas plu forlasi sian domon, pro manko je vestoj kaj ŝuoj. Dum la nuna vintro dekmiloj mortos, centmiloj malsaniĝos por sia plia vivado.

La nova Aŭstrujo, kreita de l' revolucio nenion produktas. Ĝia tero apenaŭ liveras sufiĉe por la kulturisto; la fabrikejoj ne povas labori pro manko de hejtaĵo kaj de krudaj materialoj: ĝia bestaro, antaŭe tre riĉa, estas detruita de la milito, formanĝita de l' armeoj. Ĝi ne ankaŭ povas ion aĉeti de eksterlando, ĉar ĝia valuto dudekoniĝis. Multaj familioj forhejtas sian meblaron por ne perei pro malvarmo. Oni ne povas purigi sin, ĉar jam de longe mankas sapo. Ĉiuj malsanoj — tuberkulozo, raĥito, ostomoliĝo, vejnokalkiĝo, intestmalsanoj kpt. — disvastiĝas kun terura rapido, kaj en la apotekoj kaj malsanulejoj mankas simple ĉio, tiel ke ekzemple por operacioj oni ne povas senkonsciigi la malsanulon.

Pro la ega malsano ankaŭ la moraleco agonias. La malsatantoj komprenéble etendas la manojn al ĉio manĝebla, kaj ili baraktas inter

si pro buŝpleno da pano. Kaj la miloj da virinoj kaj knabinoj, kiuj suferadas ĝismorte malsaton, malvarmon, ĉian mizeron, kiuj sub la eluzita vesto portas apenaŭ kiom ajn pecon de subvesto, ĉu ĉe ili la ideoj de moralo ne devas ŝanceliĝi?

Eĉ ne en la plej malproksima estinteco iu eŭropa loĝantaro estis tiel trafata kiel nun tiu de Vieno, diras doktoro Molden.

Jen la benoj kaj feliĉoj de kapitalismo, kiun restarigi eĉ socialistoj kiaj Adler (kiun ekzekutis Sturgk!) kaj Renner ĉiuforte klopodas.

★

## Fi-Kuraĝo de l' venkintoj.

Belgujo estis pli digna en sia malprospero ol ĝi estas en sia prospero. Dum sia martireco, kiam ĝi silente suferadis sub la peza pugno de l'bruta superreganto, ĝi havis ĉies simpation. Sed post la „venko" la sukceso kvazaŭ frenezigis ĝin. Ĝi estas ebria de „gloro", ĝi preskaŭ krevas pro fiereco. La belga ŝovinista gazetaro same kiel la ne tro sobraj bieramantoj kaj similaj drinkejo-rondoj fanfaronas senĉese, ke nur per la belgoj Entente gajnis la militon, ke la belgoj decidis la militon, ke do la belgoj estas la precipa, la plej rimarkinda, la plej merita popolo; ke ĝi rajtas postuli respekton kaj admiron de l'tuta mondo.

Komprenenble, serioza homo ne okupas sin pri tiaj infanaĵoj nek koleras pro tio. Se kelkaj belgoj deziras ridindigi sin, se ili volas imiti certajn militriĉulojn, tio ja estas ilia afero. Sed, tiu animostato de multaj belgoj havas ankaŭ pli gravajn konsekvencojn: multaj fariĝas militemaj, deziras kovri sian famegan landeton per pliaj militlaŭroj, bani denove en gloro. Tial ili volis militi kun sia najbaro, Holando; ili postulis du provincojn de tiu lando, kies burĝaro utilis tiun postulon por prokrasti la demobilizadon kaj por kaŭzi febron de ŝovinismo inter la loĝantaro. — Plia konsekvenco estas la konduto de multaj belgoj en la partoj de Germanujo okupataj de ili. Holandano skribas de tie en holanda gazeto, ke ĝenerale la francoj traktas la germanan loĝantaron ĝentile, la angloj severe sed juste, dum multaj belgoj, precipe la malaltrangaj oficiroj kaj oficistoj, uzas la okazon por malinde humiligi la falintan kaj ligitan giganton. Ili ne nur montras la venĝemon de l' maljuste atakita kaj subpremita viktimo aŭ la arogantecon de l' venkinto, sed ili kondutas kiel buboj kiuj incitas katenitan hundegon aŭ leonon malantaŭ krado.

Ili postulas sur la publika vojo soldatan saluton de ĉiu preterpasanto, ili batas kaj ofendas la homojn, kiam belgo parolas, ĉiu devas silenti,' ktp. Ili severege cenzuras la germanajn gazetojn, precipe la



revolucie socialistajn, kvankam tiuj dum la milito defendis la rajtojn de Belgujo kaj malaprobis la fi-traktadon de l'belgoj.

Esperinde la belga laborista popolo okupos sin pri la konduto de ĝiaj klerikalaj samlandanoj en la okupita parto de Germanujo. Tiuj nun ofendas la belgan popolon per siaj „heroaĵoj" kontraŭ senpova venkito.

W. N.

★

## El Britujo.

Du rezultoj el la milito estas: 1. ke la riĉuloj pli riĉiĝis pro tio ke ili pruntedonis monon al la ŝtato je granda procento; 2. ke nun preskaŭ ĉio kostas pli ol duoble ol tiom, kiom ĝi kostis en 1914.

Danke al la metiunioj kaj la strikoj la laboristoj havas pli altan salajron, sed ne sufiĉe altan por pagi por la pli alta vivkosto. La mezklasoj suferas, ĉar ili ne havas metiunion por protekti sin. En la gazetoj jam aperis artikoloj pri „La malapero de la mezklaso". Nun oni provas fondi union por ili.

Alia rezulto el la milito estas tio, ke mankas al ni dometoj. Kvankam la nacio povis organizi sin por buĉi alian, tamen ĝi ankoraŭ ne povas komenci konstrui dometojn. Birdoj nestas; sed la britoj ne povas, ili estas civilizuloj.

Plua rezulto el la milito estas tio, ke la homo ŝajnas malpli racia ol antaŭe, malpli pripensema kaj malpli zorga pri la estonteco. Li ŝajne duone atendas skuantan okazon: revolucion, nacian bankroton, aŭ ion; li ne scias kion. Eble io tenos al lia atendado.

Lastatempe, en socialistaj rondoj oni aŭdis multon pri la gildoj. Tiuj gildoj kreskos el la metiunioj, oni diras, kiam la laboristoj mem posedos kaj mem organizos kaj funkciigos sian industrion. La verkistoj pri la gildoj skribas, ke la britaj metiunioj donas esperon al la mondo per tio, ke ili montros la vojon al la vera komunismo. Mi ja opinias, ke la gildoj, en moderna formo, nepre devos veni, sed mi dubas, ĉu la britoj unue venigos ilin.

Mi bedaŭras konstati, ke la militisma spirito estas tre forta en Britujo post la tiel nomita venko. (Ho kompatinduloj! Ne ekzistas venko en la militado.)

Samtempe mi konstatas, ke ekzistas miloj da entuziasmaj pacifistoj, multaj el kiuj pasigis jarojn en la plej malaltaj malliberejoj, pro tio ke ili ne konsentis helpi iamaniere al la milita maŝino. Ili argumentas: ke, se vi volas esti muzikisto, vi devos lerni muziki; kaj se vi volas venigi la pacon, vi devos esti pacifisto. Same kiel la surdeco ne helpas al la muziko, tiel same la soldatiĝo ne helpas al la paco.

Tagulo.

## Bolŝevistaj grenadoj.

Bolŝevistaj flugmaŝinoj disĵetis inter la anglaj-usonaj linioj en Rusujo jenan alvokon:

Ni vivas en la plej grava, plej kritika periodo de l' mondhistorio: la komenco de la liberigo de laboro — la bela sonĝo de l' poetoj, la idealo, por kiu sennombraj geviroj vivis, bataladis, mortis.

Dum pli ol jarcento la popolo laborante riĉigis siajn mastrojn. Ĝi vivadis en domaĉoj, dum ĝiaj mastroj loĝadis palacojn. Ĝi nutris sin per malkara, sengusta manĝaĵo: ĝi vestis sin per fuŝ-konfekcio — ĝia vivo estis sufoka rondiro en degeneriga laboro, dum la mastroj vivadis en lukso, kiu superis tiun de l' imperioj antikvaj.

Diru, vi anglaj kaj amerikaj soldatoj, kio kaj kiuj vi estas!

Antaŭ kvar jaroj la kapitalistoj de l' mondo ĵetis vin en la nunan militon por estri novajn regionojn, ekspluati novajn arojn da sklavoj. Ili trompis siajn popolojn, kredigante al ili, ke ili batalis por libereco kaj civilizacio.

Sed la milito pruviĝas esti la lasta frenezaĵo de l' havema klaso de l' posedantoj: Kiel Simson en la templo la giganto laboro ĉirkaŭprenas la kolonojn de l' kapitalista socio, kaj la tuta konstruaĵo skuiĝas ĝis en siaj fundamentoj.

Tronoj renversiĝas kiel kegloj. Revolucio kiel puriganta ventego skurĝas Eŭropon. Rusujo montras la vojon. Bulgarujo sekvis — caro Ferdinand sinsavis, la armeo forpelis siajn oficirojn kaj starigis revolucian disciplinon per soldatsovjetoj. La reganta klaso de Turkujo estas disfalinta. La aŭstria imperio diseriĝis kiel eluzita barelo, kaj la laboristoj certigas al si iom post iom la potencon. En Germanujo finiĝis la reĝimo de l' Hohenzollern kaj de l' junkroj; la laboristoj preparas la submeton de l' klaso kapitalista kaj la fondon de sovjet-respubliko kiel ekzistas en Rusujo. En orienta kaj Mez-Eŭropo ekflamis la fajro de l' proletaria ribelo. La klaso de l' ekspluatantoj estas en kelkaj landoj venkita, en aliaj landoj ĝi estas falonta. La aŭroro de l' tago liberiga ekbrilegis.

Diru, vi britaj kaj amerikaj soldatoj, kiaj estas vi? Ĉu vi rezigne akzeptos la sorton: vivi nur por la profitoj de viaj ekspluatantoj, brave morti por la interesoj de viaj kapitalistoj? Ĉu vi deziras repreni vian vivon de elĉerpanta, teda laboro kun mizera finiĝo en ia malriĉulejo? Ĉu vi volas kondamni viajn infanojn je la sama fi-ekzistado sen espero? Ĉu vi komprenas kaj scias, ke vi estas nur kanonaĵo por internacia kapitalismo: ke vi estas malestimataj dungitoj fi-uzataj por plenumi kriman atencon kontraŭ via propra klaso, kiu penas liberigi sin? La klasoj kapitalistaj de viaj landoj konscias, ke la revolucia fluego minacas superŝuti ilin ankaŭ. Ili ĉiuforte penadas tion eviti, kaj por tiu ĉi tasko ili fi-uzas vin. Ili nutras vin per mensogoj, ili venenas viajn sentojn al viaj samklasanoj, por ke vi estu des pli volemaj dronigi la ribelon de laboro en sango.

Vi jam komencis tiun kriman agadon. Kion vi ja estas farontaj ĉi-tie en Rusujo? Sole ĉi-tion: frakasi la rusan revolucion por redoni la rusan landon al la grandbienuloj, la rusan popolon al la kapitalistoj. Viaj kapitalistoj konscias, ke ilia potenco estas ekster danĝero se ili sukcesas mortpremi la rusan revolucion.

Vi, kiuj imagas esti anoj de ŝtatoj „liberaj“, vi estas venintaj ĉi-tien, por reenkonduki kapitalistan sklavecon!

Kamaradoj, rifuzu plenumi tiun hontindaĵon. Obeu la voĉon de libereco, kiu vin vokas. Ankaŭ en viaj propraj landoj la deziro al libereco vekiĝos. Vi havas armilojn. Vi kapablas ilin uzi. Ĉu vi kiel sklavoj ilin volas apliki por defendi viajn mastrojn, aŭ ĉu vi helpos per ili liberigi vian klason? Se vi faras la unuan, tiam sciu, ke vi renkontos la fortikan sindefendon de l' unuigitaj revoluciaj popoloj de Orienta- kaj Meza-Eŭropo, kaj ke historio estos via juĝanto. Se vi decidas fari la alian, tiam ni kore bonvenas vin en la vicoj de internacia laboro.

N. Lenin, prezidanto de l' Sovjeto de Popolkomisaroj.
G. Tŝiĉerin, popolkomisaro por eksterlandaj aferoj.

★



### ESPERANTA MOVADO

## Esperanto post la milito.

Nova vigla kaj senlaca propagando por Esperanto estas tre necesa. Dum la milito la propagando, estas vere, ne tute endormis, sed ĝi estis ne tiom energia kiom antaŭe. Multaj grupoj disfalis, parte pro senlaboreco, parte pro militservo de siaj membroj kaj pro diversaj aliaj kaŭzoj. Kaj se la grupo aŭ la societo ne plu ekzistas, tiam baldaŭ la izolitaj esperantistoj malprogresas en la lingvo kaj iom post iom forlasas ĝin. Dum la propagando estis malpli energia ol antaŭ la milito, ĝi estis ankaŭ malpli efika; ĉar — internacia korespondado estis preskaŭ neebla, neniu fremdlanda esperantisto vizitis nin, multaj esperantaj gazetoj ĉesis aperi, neniu nova broŝuro aŭ libro estis eldonata, ĉio dormis, la tuta esperanta movado ŝajnis malviva. — Unuflanke do Esperanto perdis anojn, aliflanke ĝi ne gajnis novajn. Do ni devas timi, ke eĉ en ne-militintaj landoj estas nun malpli da esperantistoj ol estis antaŭ la milito.

Ega propagando do estas tree necesa por ripari la perdojn, kaj por prosperigi nian lingvon.

Kion ni povas esperi de nia propagando? Ĉu la nuna situacio de la mondo — post la milito kaj antaŭ la universala revolucio, kiu proksimiĝas — estas favora aŭ malfavora ol la internacilingva afero?

Unuflanke la propagando por lingvo internacia estas pli facila, aliflanke ĝi estas malpli facila ol antaŭ la milito.

La propagando por Esperanto estos pli facila pro tio, ke milionoj da homoj dum la milito praktike spertadis la konsekvencojn de la diverslingveco. Tuta Eŭropo estas skuita, preskaŭ ĉiuj nacioj de Eŭropo amike aŭ malamike miksiĝis, tutaj popoloj estas pelitaj eksterlanden — la mondo vidis movadojn kiajn la antikvajn popoltransmigrojn. Milionoj da homoj per ĉio ĉi plej efike spertis la maloportunecon de l' diverslingveco kaj bedaŭris la mankon de lingvo universala. Sendube, inter ili miloj estas facile gajneblaj por Esperanto, se ni Esperantistoj nur fervore propagandas. — Sed, estas ankaŭ faktoroj, kiuj malhelpos kaj kontraŭstaros la rapidan triumfon de lingvo internacia. La politika situacio de l'mondo en esenco ŝanĝiĝis. Antaŭ la milito la mondo konsistis el kelkaj grandaj ŝtatoj, ĉiu el ili ĉirkaŭata de serio da malgrandaj vasalŝtatoj. La grandaj ŝtatoj egalfortaj povis inter si neebligi unu al alia superregi la mondon. Ili estis dividitaj. Pro la ega envio inter si neniu el ili povis fariĝi la estro de la tero. Tio havis konsekvencojn ankaŭ por la naciaj lingvoj. En tiu tempo ĉiu klare vidis, ke neniu lingvo povos fariĝi internacia lingvo, pro la intersia envio. Kelkaj kredas hodiaŭ, ke la triumfinta grupo uzos sian triumfon por trudi al la cetera mondo ne nur sian industrion kaj sian komercon, sed ankaŭ sian lingvon. La lingvo de la estroj de l' mondo nepre devas fariĝi la lingvon de l' mondo — laŭ ilia kalkulo. Ili eraras, neniam la lingvo de unu popolo fariĝos lingvo universala. Krom tio la venkinta grupo estas tute ne unueco.

Ni do unuflanke ne estu tro optimistaj, kaj aliflanke ne tro pesimistaj. Kia ajn iam fariĝos la situacio de l' mondo — ĝi ĉiam bezonados lingvon komunan — tiu certeco estu nia apogilo — Esperanto triumfos, ĉar la mondo bezonas ĝin. Nia tasko estas, antaŭenigi ĝin.

Ke vivu Esperanto. — W. N.

★

## 12ª Internacia Kongreso.

Oni intencas okazigi la 12an Esperantokongreson en Aŭgusto, en Hago, Holando.

★



## B. L. E. S.
## Brita Ligo de Esperantistoj Socialistoj.

Ĉiu membro bonvole pagu sian kotizon, minimume unu ŝilingon, jam ŝuldatan por 1920, al Hon. Sek. H. Hyams, ĉe Brita Esperantista asocio, 17 Hart St. London W. C. 1. Oni ankaŭ pagu al li pro ĉi tiu numero de I. S. R.

Skribu al la Hon. Sek., se vi povos helpi al la jenaj demandoj diskutotoj:

1. Starigo de Londona Grupo de B. L. E. S.
2. Fondo de B. L. E. S. monata gazeteto.
3. B. L. E. S. aranĝoj kaj diskutotagoj ĉe la Birminghama Esperantista kongreso en Pentekosto.
4. B. L. E. S. rondiranta manuskripta gazeto.

Pri la stato de nia ligo en 1919 ni devas diri, ke ĝi apenaŭ vivis, ĝi akiris nur 22 novajn membrojn kaj vendis nur iomete da literaturo. Tamen, multaj socialistoj lernis Esperanton, kaj ili nun estas sufiĉe grandnombraj por eldoni Esp. Soc. gazeteton anglan kaj Esperantan. Ke tio plej efike helpos al nia celo, jam alilande pruvis la rezultoj. Por helpi al la Internacia Socialismo, ni devos unue organizi nin en la landoj. Do, mi petas ke ĉiu brita Soc.-Esperantisto tuj helpu al nia ligo. Precipe grave estas, ke Londonanoj skribu al mi pri la fondota grupo.

H. Hyams. Hon. Sek. B. L. E. S.

★

## DIVERSAĴOJ

Erich Mühsam, veterano anarĥista kaj lernanto de Bakunine, aliĝis (laŭ franca organo „La Feuille“ de la 9a Nov. 1919) al la Germana Partio Komunista. Ĉe sia aliĝo li deklaris, ke dum la germana revolucio li konvinkiĝis, ke la potenco nur estas konkerebla kaj tenebla per la proletaria diktaturo. La teoria konflikto inter anarĥistoj kaj komunistoj — centrala aŭ federativa formo de organizado — estas solvita de Lenin per la kreado de l' sovjetoj. — Mühsam estas nuntempe malliberulo en la citadelo de Ansbach en Bavarujo.

Labour Leader de 21a de Novembro 1919 publikigas el Chicago, Usono, ricevitan alvokon al ĉiuj liberemuloj protesti kontraŭ la senekzempla persekutado al la kuraĝaj, persistaj estroj de I. W. W. (Industrial Workers of the World — Industriaj Laboristoj de l' Mondo), kiuj meritas la solidarecon de l' internacia laborista movado.

„Populaire“, franca organo socialista, nro. de 20a de Oktobro, publikigis jenan sciigon de Lenin: „Ni en Moskvo havas plenan fidon al niaj propraj rimedoj. Ni timas ne kontraŭ-revolucion, nek Judeniĉ, nek Kolĉak, nek Denikin, kondiĉe ke la blokado finiĝu kaj ke viaj regantoj ĉesu helpi niajn atakantojn per mono, armiloj, municio. Se la francaj kaj anglaj laboristoj tion ne povos ĉesigi, tiam ni estos venkataj.“

★

## Niaj mortintoj.

En Novembro 1914 mortis en München, per propra mano, nia kamarado D. Iwanski, fervora subteninto de I. S. R. de post ĝia fondo, kaj la iniciatinto de nia socialista literaturo en Esperanto. Pro la milito li perdis la kuraĝon vivadi. Ni ne forgesos lin.

— La 18an de Novembro 1919 mortis en Hilversum, proksime de Amsterdam, F. Domela Nieuwenhuis, tutmonde konata revoluciano anarĥista. La revolucianoj de holando kondukis lin kun grandioza demonstracio, kion tiu lando neniam vidis antaŭe, al la lia lasta ripozejo.

★

## Vorto de Henri Barbusse.

Antaŭ kelkaj semajnoj estis en Parizo kunveno de demobilizitoj. Pli ol 7000 personoj ĉeestis. Unu el la parolantoj, Henri Barbusse, verkinto de l' konata militlibro „La Fajro“, diris:

La okazantaĵoj sekvas unu alian kun terura rapido. La tempo de l' vortoj kaj deklaroj estas pasinta. Ni scias, ke dum jarcentoj la popoloj vivadis en sklaveco, sed ke antaŭ du jaroj por parto de l' mondo la revolucio venis, kaj ke la revoluciaroj de l' Oriento bataladas por ĉiuj. La kontraŭ-revoluciuloj — estas ni! Ni, Okcidenteŭropanoj, ni, la grandaĝaj demokrataj landoj. Este vere, ni estas kriintaj: Pac' al Rusujo! Sed en certaj cirkonstancoj vortoj, kiuj restas nur vortoj, estas simple mensogoj. La popoloj finu la mortigon de l' komuna idealo. La kapitalista Internationale ne devas venki Rusujon, ĉar tiam ĝi estus venkinta liberecon, egalecon, fratecon. La sola sed sufiĉa rimedo por neebligi tia venkon estas la striko ĝenerala. Ĉu ĝi estas ebla? Jes, ĝi estas ebla, kaj ĝi estus estinta jam fakto la 21an de junio, se ĝi ne estus sufokita de kiu ajn diplomatio. Kamaradoj, niaj plej karaj bonoj estas en danĝero. Defendu la revolucion, la solan solvon de l' socia malbono!

★



## Al la mortinta samideano.

Vi mortis, ve, amiko nia,
la gajajn lipojn fermis vi,
silentas nun liuto via
ne himnon plu sonigas ĝi.

Vi mortis! La funebran famon
ne jam sciiĝis amikar',
ne povis pruvi al vi amon,
ne sekvi vin al la tombar'.

Vi mortis! En malvasta ĉerko
nun trovis finon la migrad'.
Nun sonĝu pri la paca verko,
pri nia cel' kaj laborad'.

La tempo pasas. Jar' post jaro
al la eterno fluas for.
Malpligrandiĝas amikaro
kaj ĉesas bati kelka kor'.

La ruĝaj floroj velkiĝados
sur via tombo en aŭtun'.
Kaj ree ili ekfloradas
en lumo de printempa sun'.

Dum multaj vintroj blanka neĝo
sur tombon falos de ĉiel'.
Senbrue kiel paca preĝo
el buŝo sankta de anĝel'.

Kaj fine iam ruiniĝos
la tombmonteto super vi.
La kruco ŝtona difektiĝos
kaj ne plu nomon montros ĝi.

En tiu tempo, kamarado,
Ni ĉiuj dormas en tombar'.
Pri nia vivo kaj revado
nur vent' murmuras en arbar'.

La nomoj estos forgesitaj,
aliaj homoj sur la ter'!
Esperu, ke la starigitaj
la verkoj daŭru pli ol fer'.

Nun dormu dolĉe, mediteme
mi turnas reen al labor'.
Ĉu malproksime aŭ ĉu hejme,
en ĝoja kaj malgaja hor' —

Vi, nia kara muzikanto,
Vi estu nia ideal'.
Spirito via — la gvidanto,
la vorto via — la signal'.

Se venos iam paca festo —
sonas liut', kantas knabin',
la glasoj tintas — muzikestro,
ni ankaŭ ne forgesas vin.

Vi aŭdu tiam najtingalon —
Sur tombo dolĉe kantu ĝi.
Du larmoj falas en pokalon,
revante pensas ni pri vi.

Toro.

★

## La malbeno de l' milito.

Ne en ĉi-tio estas la malbeno de l' milito,
Ke ĝi renversas tronojn, duone jam putrintajn,
Freneze ŝovinismon sange skurĝas,
Nudigas „glorojn“ por elmontri ties lepron:
Nek en ĉi-tio, ke palacoj ruiniĝas,
Ke en deliro sanga tigroj tigrojn buĉas —
Sed la malbeno de l' milito estas en ĉi-tio:
Ke el infanokuloj ĝi elpremas larmojn,

Ke de patrinoj ĝi forrabas filojn,
Ke en kabanoj panon ĝi mankigas,
Ke ĝi sufokas ĉiujn homajn sentojn,
Feliĉon neniigas ĉiuflanke,
La homojn retransformas en barbarojn,
Aplaŭdas monstrajn krimojn plej malpurajn,
Kaj laŭte laŭdas aĉan banditismon,
Kaj superŝutas senkulpulojn per mizeroj . . . . .

★

## KORESPONDADO

(Enpreso ĉi tie kostas la prezon de unu ekzemplero de tiu ĉi gazeto).

Aŭstralio. G. T. Swanson, Street Callandoon, Goonduvindi, deziras socialistajn korespondantojn en ĉiuj landoj.

Anglio. J. P. Cameron, 69 Schubert Rd. Putney, London S.W.15, deziras socialistojn korespondantojn por siaj kursanoj.

Germanio. Kdo Franz Milanowski, 1914 loĝinta en Bern, kie vi troviĝas? Otto Tesch, Berlin N 24, Gr. Hamburger Str. 2 III.

M. Schulz, Neukölln, Hertzbergstr. 30, deziras korespondantojn en ĉiuj landoj.

F. Bahls, Berlin N 65, Malplaquetstr. 13, deziras korespondadon per ilustritaj kartoj.

★

## Socialista literaturo en Esperanto.

Aĉeteblaj ĉe redakcio de I. S. R., Ostadestraat 94, Amsterdam, Nederlando, kaj ĉe ĝiaj agentoj, jenaj verkoj: 1. La Evangelio de la Horo, el franca lingvo, de P. Berthelot; prezo 8 Sd. 2. Kio estas Socialismo, el itala lingvo, de Enrico Ferri; prezo 8 Sd. 3. Pri la esenco de Konstitucio, el germana lingvo, de F. Lasalle; prezo 8 Sd. 4. La Piramido de l' Tiranio, el holanda lingvo, de F. Domela Nieuwenhuis: Prezo 8 Sd. 5—6. La Reforma Mono de Silvio Gesell, de D-ro Paŭlo Stanišiĉ; Prezo 16 Sd. 7. Por ataki kaj por defendi, de Wilhelm Liebknecht; Prezo 8 Sd. 8. La Salajro, de Petr Kropotkin; Prezo 8 Sd. 9—12. La Mizeruloj, el franca lingvo, de Victor Hugo (Fantine I), prezo 35 Sd., afrankite. 13—17. La Mizeruloj, de Victor Hugo (unua sekvo; Fantine II), prezo 45 Sd.

Ĉiuj prezoj laŭ la landa valuto.

Presejo: W. Büxenstein Druckereigesellschaft, Berlin SW.